

Simpozio kadre de la 48-a ILEI-konferenco. Oostende, Belgio, julio 2015

Prelego de D-ro Reginald Moreels pri „Kuracistoj sen limoj & kiel eviti militojn“ (tradukita de Mireille Grosjean; teksto sen la fotoj)

Mi ŝatus prezenti al vi iom el miaj pripensoj surbaze de miaj spertoj, ĉar mi ankoraŭ nun laboras, iras al eksterlando. Antaŭ kelkaj semajnoj mi estis en orienta Kongo kaj operaciis. Mi baldaŭ reiros al Burkina Faso, Benino kaj al orienta Kongo. Ĉiuj tiuj konfliktoj faras, ke mi devas pripensi ekde longa tempo pri la problemo de perforto : kiel eblas, ke homoj uzas tiom da perforto. Mi volas lige kun tio omaĝi al la Esperanto movado. Jam la decido eklerni la lingvon estas grava paŝo; plie vi konsideras la homon kiel mondanon kaj ne kiel membron de nacio, tribo aŭ etno.

Mi ĵus restadis en Sirio, Irako kaj Pakistano, kaj vidis mem ĉion, kion kruelan homo povas fari al alia homo. Mi ne fariĝas pli pesimisma pri la homo ĝenerale sed pli realisma ol mi estis en mia junaĝo. La idealismo restas sendepende de la biologia aĝo, tamen oni evoluas. Mi nun volas reiri al homo antaŭ 17 jarcentoj : Sankta Aŭgusteno, ĉu vi konas lin ?

https://eo.wikipedia.org/wiki/A%C5%ADgusteno_de_Hipono

Mi ne konas ĉiujn liajn verkojn, sed mi trovis tekston, kie li montras, kiel homoj povas uzi perforton. Li pripensis, ĉu ekzistas justa perforto ?

Mi transprenos liajn pensojn al la nuna jarcento. Por helpi al vi flari la etoson, mi nun montros kelkajn fotojn de kirurg-arto. Se iu ne volas vidi tion, tiu povas kovri al si la vizaĝon. Unue vi vidos pri elekta kirurgio, kiu rilatas al paca situacio ; tio ne similas al milittempa kirurgio en landoj kun konfliktoj (aparta fako ene de la kirurgarto).

Kelkaj memoraĵoj restas en mia memoro, mi ne povas forgesi. Ekzemple en Kamboĝo mi devis amputi infanon fortranŝante la du kruojn pro vundo de landmino. Tiu knabo metis piedon sur mino, kiam li revenis el la lernejo je la kvara horo posttagmeze. Mi ne povas rakonti per vortoj, mi povas nur montri bildojn. Mi tiom malŝatas tiujn aĉajn landminojn, kiuj restas dum jarcentoj ; meti tian minon daŭras unu minuton. Se ni nun ĉesus meti tiajn minojn, ni bezonus 250 jarojn por purigi la planedon. Estas nun esploro por forpreni la landminojn. Estas interesa agado de belgo, el Flandrio, kiu malkovris, ke ratoj kapablas trovi la minojn. Nun oni uzas ratojn.

Kiam temas pri ostarompiĝoj, oni kutimas fiksi la membron per eksteraj teniloj, metalaj. Se estas vundo per kuglo, ĉiam estas enirtruo kaj elirtruo kaj tiujn du truojn oni devas trovi. Anstataŭ diri « Kuracistoj sen limoj », oni diras « kuracistoj sen ferioj ».

En Somalio en 1993 estis armitaj bandoj, kiuj provis protekti nin. Ili postulis monon por fari tion. Mi flegis junan viron, kiu ricevis pafon, kuglon. Post semajno mi revidis lin en lia soldata aktivado kaj tio pensigis min : al kio utilas mia agado ?

La problemo plie rilatas al internacia juro. Sciu, ke « Kuracistoj sen limoj » estas sendependa institucio, ne ligita al Ŝtatoj. Male CICR, la Ruĝa Kruco, dependas de la Ŝtatoj. Siatempe militoj okazis inter Ŝtatoj.

La origino de la nunaj konfliktoj estas en la jaroj 1970, 1980, kiam ekzistis kontraŭaj movadoj en diversaj Ŝtatoj, liberigaj movadoj, kiuj luktis kontraŭ la registaroj. Post la dua mondmilito la konfliktoj naskiĝis ene de la Ŝtatoj. Ekzemple en Angolo, Mozambiko, Salvador, Nikaragvo.

En Angolo la urbo Kuito estis sieĝita de unu atakgrupo dum 10 monatoj. Kiel unuaj ni eniris en la urbon. Estis diversaj bezonoj : vakcini... La hospitalo estis ekster la kontrolita zono. Ni devis iri al la domoj preni tie la vunditojn. La unuan operacion mi faris en detruita banko, sur banka tablo. Poste ni uzis alian bankon por operacii.

Nun ni iru al mia pripensoj :

Perforto apartenas al ĉiuj epokoj. Homo kapablas fari bonon kaj malbonon. De ĉiuj estaĵoj la homo estas la sola, kiu kapablas fari malbonon kun intenco. Besto batalos por trovi nutraĵon, batalos por konservi sian teritorion, volos protekti sian familion. Tamen homo povas senkiale agi perforte. Tio komenciĝis en la epoko de Kaino kaj Habelo (el la Biblio). Unu estis bredisto, la alia agrikulturisto. Habelo la bredisto povis oferi bestojn al Dio. Kaino povis doni cerealaĵojn. Dio ne akceptis cerealaĵojn (mi ne scias kial, temas pri legendo ...) kaj tio faris Kainon ĵaluza, kaj tio estas la kaŭzo, pro kio Kaino mortigis Habelon.

Religioj ofte estis pretekstoj por militoj. Kristanoj, nun islamanoj, ankaŭ hinduoj.. Diversaj militoj havis tiun pretekston, sed la vera intenco estis provo akiri novan teritorion. Ekzemple en la Biblio la lando Kanaano ; tio estas Palestino. Ĉiuj volis konkerti la urbon Jerusalemo. Tiu lukto en tiu regiono estas terura. Antaŭ nelonge mi estis tie, tiu lando fariĝis lando de muroj.

Aŭgusteno provis intelekte esplori pri la kialoj de militoj. Li provis raciigi la perforton. Kompreneble Aŭgusteno kaj liaj posteuloj estas kontraŭuloj de perforto. Li ne prezentis justan militon, gravas diri tion.

Poste venis Tomaso de Akvino https://eo.wikipedia.org/wiki/Tomaso_de_Akvino en la 13-a jarcento kaj Hugo Grotius en la 17-a jarcento https://eo.wikipedia.org/wiki/Hugo_Grotius , kiuj esploris, kial iu povas lanĉi militon. La perforto devas esti la lasta rimedo. Aŭgusteno argumentis, ke la milito devas esti pravigita por protekti civitanojn kontraŭ atakoj, por denove validigi la rajtojn de la civitanoj aŭ por reinstali justan politikon kaj justan Ŝtaton. Do neniam milito povas komenci por akiri novan teritorion aŭ pro ekonomiaj kialoj, kiel tio ofte okazas nuntempe. Do nuntempe ni parolas pri sindefendo, memdefendado. Ofte Ŝtatoj uzas tiun vorton ne ĉiam por vere sin defendi.

Ekzemplo estas invado de Ugando fare de Tanzanio, kie Nyerere

https://eo.wikipedia.org/wiki/Julius_Nyerere

forpuŝis Idi Amin Dada https://eo.wikipedia.org/wiki/Idi_Amin ; li kontribuis al remeto de demokratio, tamen poste la reĝimo fariĝis kruela.

Alia situacio estis en orienta Pakistano en 1970, kiam islamaj pakistananoj abunde masakris bengalajn homojn, kaj elmigris 10 milionoj da bengalaj homoj al Barato. Barato ne povis akcepti tiom da rifuĝintoj ; pro tio ĝi kreis en tiu regiono novan landon Bengladeŝo.

Nun mi parolas el mia 30-jara sperto kiel kirurgo.

Alia estas Vjetnamio kaj Kamboĝo : ĉiuj kunlaborantoj de la hospitaloj, kie mi operaciis plurfoje, perdis parencon dum la genocido en la jaroj 1975 ĝis 1979. Antaŭ 1975 okazis la terura reĝimo de Lon Nol https://eo.wikipedia.org/wiki/Pol_Pot , dume neniu reagis. Kiam Vjetnamio invadis Kamboĝon en 1979, tiam la tuta mondo protestis.

Estas giganta hipokriteco, iam la registaroj kaj la internaciaj organizaĵoj reagis, iam ne ; mi membris en tiaj organizaĵoj, mi povis konstati tion. Rusoj kun preteksto sindefendi invadis Afganion, kaj Usono invadis Irakon pretekstante la ekziston de potencaj armiloj.

Usonanoj kaj Britoj faras diferencon inter « preventive war » kaj « preemptive war ».

Okaze de « preemptive war » iu atakas por eviti, ke la alia atakas. En « preventive war » oni supozas, ke venos atako kaj pro tio oni atakas detruante la armilojn de la alia. La invado de Irako estis « preemptive war ». Do pensante tiel, oni povas pravigi atakon de diktaturo, tamen atako de Irako kun multe da nafto estas pli interesa ol atako de Burundo...

Laŭ Aŭgusteno nur legitima instanco rajtas deklari militon. Do Ŝtato deklaris militon al alia Ŝtato. Nuntempe oni diras, ke la milito povas komenci nur post voĉdono de la Konsilio de Sekureco de UN kaj eventuale laŭ rezolucio de la Ĝenerala Asembleo de UN. La Konsilio de Sekureco ne evoluis ekde 70 jaroj kaj ne spegulas la nunan mondon. Ne plu estas legitimeco por la vetorajtoj de la 5 daŭraj Ŝtatoj. UN konsistas el Ŝtatoj. Ŝtatoj estas la ĉefaj vendistoj de armiloj.

Kiel kuracisto mi flegis plej ofte vundojn kaŭzitajn de minoj; tamen kiel ministro mi provis proponi leĝon kontraŭ la eksportado de laŭleĝaj armiloj.

En Oostende estis firmao produktanta armilojn, kies estro estis Viktor Bout

https://eo.wikipedia.org/wiki/Viktor_But ; li nun sidas en Tajlando en malliberejo. Foje mi

renkontis lin en orienta Kongo ; tiaj homoj estas ĉie en la mondo. Mi multe diskutis kun armilovendistoj. Ili diras al mi : Vi erare kredas, ke sekureco kreskos sen armiloj. Ni diras, ke sekureco kun armiloj kreskas.

Perforto devas esti nur en kazo de bezono kaj tiel malforta kiel eblas, laŭ Aŭgusteno ; devas esti proporcio. Vi konas la Universalan Deklaracion de Homaj Rajtoj. Ĝi estas konceptita por paca tempo. En milita tempo validas la Humana Juro laŭ la Ĝenevaj Konvencioj de 1947 kaj la Aldonaj Protokoloj de 1977. Protektado de hospitaloj, neniu mortigo de civitanoj, protektado de havaĵo kaj de energifontoj, ktp. La Aldonaj Protokoloj estis bezonataj por trakti la enlandajn konfliktojn.

Bedaŭrinde tiuj reguloj ne estas respektataj. Liberigaj movadoj uzas la civitanojn metante ilin en la mezon de la cel-lokon kiel homan ŝildon. Plie multaj civitanoj suferas.

Mi flegis preskaŭ nur civitanojn krom en Sirio. Tie mi flegis soldatojn kaj Al Qaida ĉeestis por kontroli mian laboron. Fakte estas tre malfacile trovi tiun « proporcion » laŭ Aŭgusteno ; ĉiam okazas kreskado de perforto.

Fakto estas la uzo de kemiaĵoj kontraŭ Kurdoj en Irako en 1988. Mi kiel unua eniris tiun urbon Halabĝo, Helebce (kurde) <https://eo.wikipedia.org/wiki/%C4%A4alab%C4%9Do> kun kolego, ni estis nur du, ne oficiale. Ni vidis homojn, kiel oni vidas homojn en Pompejo <https://eo.wikipedia.org/wiki/Pompejo> : la infano falis kaj mortis apud sia pilko, la virino apud sia kuirpoto, la ŝoforo falis sur sia stirrado. Estis belaj kadavroj, se oni povas diri... La gaso Sarin efikas post 60 ĝis 90 sekundoj, do la sango restas kompleta, la lipoj restas ruĝaj... Mortis 7000 homoj. Mi ankaŭ vidis vunditojn pro Iperit-gaso (mustarda gaso) uzita ĉi tie dum la unua mondmilito. Tiu gaso ne mortigas tuj aŭ nur vundas la okulojn, haŭton kaj mjelon. En tiu hospitalo estis vunditoj en brunaj piĝamoj kaj aliaj en grizaj piĝamoj. Unu grupo estis irakanoj, la aliaj estis irananoj. Sur lito ili kune ludis kartojn. Tio montras la absurdecon de militoj. Fakte tio okazas ofte, ke malamikoj paciĝas.

Unu aferon mi neniam povos akcepti ĝis mia morto : tio estas la manko je ia reago de la internacia komunumo okaze de la genocido en Ruando. Fortimigan perforton oni rajtas uzi nur por ĉesigi genocidon aŭ grandskalan lezon de Homaj Rajtoj. Tio estas aktiva senperforto. Tio ne okazis pri Ruando. Estis pluraj genocidoj en la mondo. Mi estis tiam en Ruando, kiel belgo mi devis fuĝi. Ne venis ia reago de la mondo. Mi parolis kun blukaskuloj de UN, kiuj nur devis esti tie, ne rajtis interveni. Ili rakontis, ke ili uzis la glacoviŝilojn por forviŝi la sangon sprucantan sur la aŭtoj. Fakte temis pri industria murdo per maĉetoj. Ene de monato mortis 900.000 homoj. Tion mi ne povas kompreni, 50 jarojn post la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj ! Homo ofte estas samtempe bonkora kaj aĉa. Same mi. Homoj estas tiaj. Kelkaj asertas, ke se estus dio, dio ne kreus bonkorajn kaj aĉajn homojn... Mi estas kredanto. Kiel eblas, ke dio lasis okazi aĉegaj krimoj. Sed al kio utilis la libereco de la homo, se dio kreus nur bonkorajn homojn ? Poste mi iris al kurso pri aktiva senperforto laŭ Gandhi https://eo.wikipedia.org/wiki/Mohandas_Karamchand_Gandhi . En kazo de maljusteco eble perforto estas preferinda al malkuraĝa fuĝo. Tio ne samas kiel pacifismo. Ĝajnismo en la sesa jarcento antaŭ Kristo, <https://eo.wikipedia.org/wiki/%C4%9Cajnismo> malakceptas iun perforton por atingi paradizon, eĉ malakceptas mortigon de kulo. Tio inspiras min. Mi esploras pri kristanismo, budhismo kaj tiaj pripensoj. Mi elektis kristanismon, ĉar la frazo « Vi devas ami vian malamikon » estas unika. Malmultaj homoj kapablas tion ; unue oni devas pardoni. Poste eĉ evoluigi amon. Malfacila paŝo.

Kutima situacio en konflikto estas « Majoro - minoro »(MM) : unu nepre volas pravi, fariĝas « majora ». Tio ĉiam vidiĝas en la ĉiutaga vivo. Eĉ en Esperanto ; plie ne ĉiuj parolas ĝin. Eĉ havante komunan lingvon oni povas konfliktumi. Ni devas lerni eliri el tiu MM etoso. Pat Patfoort el Flandrio instruas tion https://it.wikipedia.org/wiki/Pat_Patfoort . Kial la alia pensas tiel ? Oni provu transiri al la pensmaniero de la aliulo. Se iu sentas humiligon, venos konflikto laŭ filozofo Levinas https://eo.wikipedia.org/wiki/Emmanuel_Levinas . Malfacila trejnado. Bezonatas sincera komunikado, vereco ; respekti la aliulon kaj sin mem. Kreemo, spontaneco : atenti pri korpa lingvo, rigardi la homojn en la okuloj. Uzo en persona vivo endas, tamen malfacilas. Libereco ĉiam ligiĝas al respondeco. Ekzisto ne eblas sen kontakto kun aliulo, ia kontakto. Respondeco en unua, dua kaj tria persono ; unua persono : pri si mem ; en dua persono : kun aliulo ; en tria persono : solidareco kun nekonataj homoj. Ne ekzistas justaj militoj. Neniam plu estu milito. Endas transiri al nova socio. Ni devas esti optimismaj, ĉar homoj kapablas superi la malbonajn tendencojn. Vi lernis universalan lingvon, tio estas grava paŝo al tio.

Debato

Demando :

Ĉu iu vere kredas, ke la fina venko de Esperanto malebligis militon ?

RM. Mi kredas ke ne. Tio ne forprenas la valoron de via agado. Mi malfacile povas imagi esperantiston, kiu komencas militon. Ekmilito ne estas nur lingva afero. La decido ne estas nur lingva.

Rimarko de Mirejo Grosjean:

Pri Ubuntu : vi parolis pri la rilato kun aliulo, mi devas pripensi pri Ubuntu.

RM. Mi dankas, ke vi menciis tion. Mi ofte renkontis tiun vorton, temas pri paca amo. Mi konas tiun vorton kaj aprezas ĝin. Temas pri serena sinteno, la socia aspekto gravas. Unu ekzisto dependas de alia.

Demando :

1993 : iu organizis, ke vi povis renkonti la kontraŭulojn de la registaro de Zairo. Tio okazis en Svislando, en Caux. Ĉu vi povus informi nin pri la sekvoj de tiu rendevuo ?

RM. En tiu vilaĝo estis grupo, kies nomo estis « Réarmement Moral » (morala rearmiĝo). Nu ĝi havas novan nomon. Tre ofte paco povas renaskiĝi en kaŝitaj lokoj. Ĉiumaniere mi estis en Kongo kiel belga ministro, kaj tiam mi renkontis homojn el Caux. Mi povis konstati, ke tuj la etoso estis tute alispeca, elkora kaj sincera. La efiko de la diskutoj en Caux ne estis tuja, sed povas montriĝi poste, multe pli poste.

Demando de Bharat Ghimire:

Mi estas el Nepalo. Vi laboris en la belga registaro. Antaŭ dek jaroj Nepalo havis konflikton. Belgio vendis armilojn al la registara armeo kaj ili transiris al la kontraŭuloj. Kial vi ne povis ĉesigi tiun vendon ?

RM. Mi estis en Nepalo por konferenco, mi konas la landon. Mi estis ministro dum 4 jaroj. Kiel ministro mi povis preventi konfliktojn kaj helpi al evolulandoj. Tio ne respondas al via demando. Mi supozas, ke la belgaj armiloj por Nepalo estis post mia ministra oficperiodo. La ministro pri eksteraj rilatoj devas subskribi la vendon de armiloj. Li telefonis al mi por informiĝi : kion vi opinias pri tio ? Mi diris ne, same li diris ne. Ne eblis, ke en la parlamento du ministroj ne samopinias. Alia ekzemplo estis, kiam mi decidis fermi armilfirmaon. Venis demando : ĉu vi ankoraŭ apartenas al la registaro aŭ ĉu vi laboras kontraŭ la registaro ? Alia ekzemplo estas, kiam mi organizis en 1998 internacian konferencon pri malarmado por daŭripova evoluo en Bruselo ; estis invititaj :

Dalai Lamao <https://eo.wikipedia.org/wiki/Dalai-lamao>

episkopo Desmond Tutu [https://eo.wikipedia.org/wiki/Desmond Tutu](https://eo.wikipedia.org/wiki/Desmond_Tutu)

Oscar Arias, Nobel-pacpremiito [https://eo.wikipedia.org/wiki/%C3%93scar Arias](https://eo.wikipedia.org/wiki/%C3%93scar_Arias)

krome 900 NRO-oj, 70 registaroj partoprenis. Venis persona mesaĝo de Dalai Lamao, ĉar li ne povis esti en Bruselo. La ministra konsilio volis malebligi al mi la laŭtleĝadon de la letero. Ĉinio telefonis al la registaro por malebligi tion.

Mi respondis : mi emas ankoraŭ pli forte laŭtleĝi tiun dokumenton. Ĉinoj kaj Rusoj estis en la salono, ne anoncote. Miaj kolegoj minacis, dirante, ke eble la rilatoj malboniĝos inter tiuj du Ŝtatoj kaj Belgio. Kiel ministro, oni povas demisii, tamen se oni demisias, oni nenion plu povas fari, neniu aŭskultas vin plu. Tiu ekvilibro estas tre malfacila ; aliflanke tia ekvilibro estis tre interesa aspekto.

Mallonga biografio:

D-ro Reginald Moreels estas belga kuracisto kun kirurgia specialiĝo.

Vikipedio: https://fr.wikipedia.org/wiki/R%C3%A9ginald_Moreels

De 1982 ĝis 1995 li laboris kiel kirurgo en Ostendo kaj estis samtempe membro de la internacia, neŭtrala medicina helporganizo “Kuracistoj sen Limoj”, kiu aktivas en 88 landoj kaj kiu helpas homojn dum militaj konfliktoj kaj post naturkatastrofoj. De 1986 ĝis 1994 li estis ĝia prezidanto. Dum tiu ĉi periodo li ankaŭ aktivis kiel kirurgo en pluraj tropikaj landoj kaj en eŭropaj landoj kun medicinaj problemoj (Angolo, Etiopio, Liberio, Rumanio kaj pluraj aliaj landoj). Li entreprenis plurajn diplomatiajn misiojn al landoj en milito kaj al teritorioj trafitaj de naturkatastrofoj.

De 1995 ĝis 1999 li estis belga ŝtatsekretario por kunlaboro kun evolulandoj; en 1999 li estis belga ministro pri internacia kunlaboro kaj de 1999 ĝis 2000 li estis belga senatano kaj samtempe membro de la parlamenta komisiono por homaj rajtoj, rifuĝintoj kaj azilpetantoj de la Konsilio de Eŭropo.

De 2008 ĝis 2013 li estis sendito de la belga ministerio de eksteraj rilatoj al la regiono de la Grandaj Lagoj en Afriko por kontribui al pacplano kaj por helpi al la tieaj homoj.

Resume: Doktoro Moreels volas kontribui al la kreo kaj konservado de la paco ie ajn en la mondo kaj doni al homoj homan vivon. Li estas aŭtoro de pluraj libroj kaj artikoloj pri milita kirurgio, humana diplomatio kaj politiko de migrado kaj demokratiigo.